



# Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 2/2023 (228)

26. 10. 2023

## Esperantistoj sukcesaj en ĉi-jara „Moviĝante por Paraple“



Foto: E-mental'

En majo 2023 preskaŭ kvar dekoj da esperantistoj partopenis karitatan konkurson „Moviĝante por Paraple“ por subteni handikapulojn. Ili diligente marŝis, biciklis kaj kuris. La E-teamo estis la sesa inter 312 teamoj. Unuopaj partoprenantoj estis tre sukcesaj kaj eĉ ses el ili finis en la unua deko. La plej bona estis Martin Vávra, kiu estis la dua piedmarŝanto.

*(Legu pli sur la paĝo 4)*

### EL LA ENHAVO

Tradukita teatraĵo.....	3
Moviĝante por Paraple kaj Helpu helpi .....	4
Ankaŭ ĉi-jare KAVA-PECH ne pigras .....	5
Pri la libro „Mia vivo kun Esperanto“ .....	7
Kiel po-ŝtup-umas „la afero Altior“ .....	10
Nadĵe / La Espero .....	18
Josef Rumler kaj Esperanto .....	20

### O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980  
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze  
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7  
Vychází třikrát ročně  
Kontakt: [t.brachacek@seznam.cz](mailto:t.brachacek@seznam.cz)  
Redaktor: Tomáš Břicháček  
Korektury: Pavol Petřík

# AKTUALAĴOJ

## Okazintaĵoj

**05/01/2023** – diskuto pri eĥoj de la 120-a datreveno de la klubo en E-amaskomunikiloj (*kunvenejo*)

**12/01/2023** – aperis Bulteno n-ro 1/2023

**14/01/2023** – komuna renkontiĝo omaĝe al beata Odoriko organizita de la Instituto de renesanco de kultura heredaĵo kun ĉeesto de multaj pragaj klubanoj kaj aliaj esperantistoj (*preĝejo Panny Marie Sněžné*)

**02/02/2023** – prezentado de Tomáš Břicháček pri la konstitucia rolo de la prezidento de la respubliko (*kunvenejo*)

**02/03/2023** – traduka kaj muzika seminario, dum kiu oni kompletigis tradukojn de la kantoj *Vltavo*, *Vltavo* de Karel Hašler kaj *Kulhavá kobyla* de Vilda Dubský (*kunvenejo*)

**16/03/2023** – prelego de Tomáš Břicháček pri la poeto Josef Rumler (*kunvenejo*)

**30/03/2023** – prelego de Petr Chrdle pri la paraleloj inter Komenský kaj Zamenhof (*kunvenejo*)

**13/04/2023** – Leonarda Chaloupková kaj Vlasta Stará prezentis kun lumbildoj la agadon de la Esperanto-klubo Benešov (*kunvenejo*)

**27/04/2023** – prezento de Petr Chrdle pri du novaj libroj de sia eldonejo: *Sadako volas vivi* kaj *Mia vivo kun Esperanto* (*kunvenejo*)

**25/05/2023** – muzika vespero kun Pavla Dvořáková – unue prelego pri muzikaj komponistoj-esperantistoj, poste kuna kantado kun ukuleloj (*kunvenejo*)

**22/06/2023** – prezentado de Vlasta Piščíková pri siciliaj lokoj ligitaj kun la komisaro Montalbano (*kunvenejo*); vizito de du brazilo-usonaj gastoj (Hermes kaj Marcia Illana)

**12/09/2023** – Vlasta Piščíková, Jan Šebetovský kaj Petr Javorík transdonis al Zdeněk Svěrák Esperantan tradukon de la teatra ludo *Vražda v salónním kupé*

**12/10/2023** – muzika vespero kun Pavla Dvořáková – unue prelego pri Profesiaj vidartistoj-esperantistoj, poste kuna kantado kun ukulelo (*kunvenejo*)

# Tradukita teatraĵo

Vlasta Piščíková

La 12-an de septembro 2023 kunvenis tri membroj de E-mental' (Jan Šebetovský, Vlasta Piščíková kaj Petr Javorik) kun Zdeněk Svěrák kaj transdonis al li Esperanto-subtekstojn por la teatraĵo *Murdo en salona kupeo*.

La *Murdo en salona kupeo* estas teatraĵo, kiun prezentas teatro de Jára Cimrman. Aŭtoroj estas Zdeněk Svěrák, Ladislav Smoljak kaj Jára Cimrman – fiktiva ĉeĥa geniulo. Enhavo iom similas al la fama verko de Agatha Christie *Murdo en la Orienta Eksprestrajno*.

Zdeněk Svěrák akceptis la tradukon (sur KD kaj ankaŭ sur la USB-poŝmemorilo). Li estis plezurigita pro la laboro kaj dankis. Volonte li lasis sin foti kun Esperanto-flago.

La *Murdo en salona kupeo* estas jam la dua teatraĵo, kiu estis tradukita en Esperanton. La unua estis *La konkero de la Norda Poluso* kaj ĝi estis transdonita al Zdeněk Svěrák en la jaro 2017.

Kiel la tria teatraĵo por traduki estis elektita *Longulo, larĝulo kaj miopulo*. La tradukanta triopo jam komencis labori kaj ili esperas, ke kvankam la teksto estas tre malfacila, la traduko estos same sukcesa kiel en antaŭaj teatraĵoj.



[www.e-mental.cz](http://www.e-mental.cz)

# Moviĝante por Paraple kaj Helpu helpi

Vlasta Piščíková



## Moviĝante por Paraple

Dum 25 tagoj – de la 1-a ĝis la 25-a de majo 2023 – 39 esperantistoj aktive partopenis karitatan konkurson „Moviĝante por Paraple“ por subteni korphandikapulojn. Ili diligente marŝis, biciklis, kuris kaj fine ili komune atingis 7468,854 km.

Ne sufiĉis tio por la unua loko, sed esti la sesa el 312 teamoj estas bonega.

Unuopaj partoprenantoj estis tre sukcesaj kaj eĉ ses el ili finis en la unua deko. La plej bona estis Martin Vávra, kiu estis la dua piedmarŝanto. Li sukcesis kolekti 582,2 km kaj antaŭigi pluajn 93

piedmarŝantojn. Gratulon al Martin! Kaj gratulon al ĉiuj partoprenantoj!

## Helpu helpi

La 21-an de junio 2023 okazis jam la deka aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental' aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago.

Estis kolektita mono por 51 brikoj!

La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj kaj enmetitaj en simblan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.

Grandan dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj helpis surloke kaj apartan dankon al pragaj, eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj denove ne hezitis sendi monon!!!



[www.e-mental.cz](http://www.e-mental.cz)

## Ankaŭ ĉi-jare KAVA-PECH ne pigras

Petr Chrdle

Ekde la komenco de ĉi tiu jaro la eldonejo KAVA-PECH eldonis jenajn librojn en Esperanto aŭ ligitajn al Esperanto:

La jam anoncita eldono de *Sadako volas vivi!* verkita de Karl Bruckner en perfekta traduko de Jan Duda finfine aperis. La vorto *finfine* taŭgas, ĉar estis problemoj kun la akiro de la kopirajto, kiun ni tamen sukcesis venki. Temas pri romanstile prilaborita vera okazado de japana knabino Sadako Sasaki, kiu travivis la atombombadon de Hiroŝimo sen videblaj vundoj, tamen post 9 jaroj ŝi mortis pro leŭkemio, malsano kaŭzita de radiado.

*Bluaj neĝoj* de Piotr Bednarski en traduko de Ewa Grochowska estas plia ero en la vico de la kontraŭmilitaj libroj de KAVA-PECH. Temas pri aŭtobiografiaj rakontoj de travivaĵoj de la aŭtoro, nun fama pola verkisto, tiam juna knabo, kiu estis dum la dua mondmilito deportita kun la gepatroj al Siberio. Li ĝisvivis la liberecon preskaŭ mirakle, la sola el la tuta familio. La titolo rilatas al la koloro de la neĝo je temperaturo de minus 40 gradoj de Celsio.

*La lasta vojaĝo de Cesaro kaj aliaj noktaj aventuroj* estas finalistaj noveloj de la Interkultura Konkurso. La kolekto prezentas la rezulton de la konkurso: 37 finalistajn novelojn elektitajn inter 421 konkursaĵoj. Ĉiuj estas prezentitaj en Esperanto kaj ankaŭ en la originala lingvo tiuj, kiuj ne estas verkita en Esperanto (franca, itala, rusa, ukraina).

*Ekster la limoj. Apokrifoj* estas la apokrifaj kristanaj rakontoj, kiuj ne eniris en la Bibliion. Ĉiujn tradukis Gerrit Berveling. Fine estas envicigita riĉa bibliografio de Berveling, kaj liaj verkoj, kaj tradukaĵoj.

*En la muziko estas la vivo de ĉeĥoj* verkita de Jan Duda estas bazita sur la prelego de la aŭtoro prezentita dum la UK en Prago en la jaro 1996. Ĝi koncize, sed trafe resumas la evoluon de muziko en Ĉeĥio kune kun priskribo de elstaraj ĉeĥaj komponistoj fronte de Smetana, Dvořák, Janáček kaj aliaj. Kiel titolon la aŭtoro elektis citaĵon de la komponisto Bedřich Smetana.

Fine mi prezentas ankaŭ proprajn librojn, ĉe kiuj mi estas ne nur eldonisto, sed ankaŭ aŭtoro. En ili mi resumas mian ĝisnunan poresperantan kaj peresperantan laboron. Ambaŭ enhavas multajn nigroblankajn fotografiaĵojn.

*Mia vivo kun Esperanto* enhavas kvar partojn: A, kiu priskribas mian Esperantan karieron kiel funkciulo de pluraj Esperanto-organizaĵoj, sed ankaŭ kiel ĝia profesia utiliganto. Ĝi montras kaj seriozajn, kaj gajajn rememorojn, ofte lernigajn. Parto B konsistas el elektitaj fragmentoj el miaj verkoj kaj diversaj artikoloj el Esperanto-gazetaro. Parto C montras

bibliografion rilatantan al Esperanto kaj parto D specimenojn de la oferto de mia eldono.

*Život s esperantem* (Vivo kun Esperanto) estas celanta la neesperantan publikon, tial ne temas pri Esperanto-versio de la antaŭa, sed tute diferenca libro, kvankam preskaŭ ĉiuj bildoj estas la samaj. Ĝi enhavas tri partojn kaj kvar aldonaĵojn. Parto A estas laŭstruktore la sama kiel tiu en Esperanto, tamen la teksto estas kongruigita al la celgrupo de legantoj. La parto B enhavas pli frue aperigitajn artikolojn rilatantajn al Esperanto en la ĉeĥaj periodaĵoj (unu en la slovaka), la parto C specimenojn de la eldonita literaturo. Aldonaĵojn kreas unue Kompleta gramatiko de Esperanto laŭ Henri-Sébastien Erhard en traduko de Dagmar Chvátalová kaj Marek Blahuš, due kelkaj esprimoj en Esperanto kun la ĉeĥaj tradukoj, trie la Akademio de Esperanto (priskribo de ties taskoj) kaj kvare Rekomenditaj interretaj portaloj por pliaj informoj. Pli da informoj vi trovos en la retejo <https://kava-pech.cz>.

---



*22/06/2023 – post la prelego de Vlasta Pištíková pri Sicilio kun du brazilo-usonaj gastoj (Hermes kaj Marcia Illana)*

## Pri la libro „Mia vivo kun Esperanto“



En aprilo 2023 aperis membiografio de nia elstara membro kaj unu el la ĉefaj motoroj de la ĉeĥa Esperanta movado, Petr Chrdle. Ĝi nomiĝas *Mia vivo kun Esperanto*.

La libro estas disdividita al kvar partoj:

- A) La aŭtoro priskribas sian Esperantan karieron kaj kiel funkciulo de pluraj Esperanto-organizaĵoj (UEA, ĈEA, IFEF, AIS) kaj kiel sukcesa utiliganto de Esperanto profesie en sia eta entrepreno Kongresa kaj Kleriga Agentejo KAVA-PECH kaj samnoma eldonejo. Li montras kaj seriozajn kaj gajajn momentojn de sia Esperanto-vivo, ofte lernigajn.
- B) Elektitaj fragmentoj el verkoj de la aŭtoro kaj diverstemaj artikoloj, kiujn li konsideras gravaj.
- C) Elektita bibliografio de la verkoj de la aŭtoro rilatantaj al Esperanto.
- D) El nuna oferto de la libroj en Esperanto de la eldonejo de la aŭtoro, KAVA-PECH. La libro estas ilustrita per multaj fotografiaĵoj.

Sube ni elektas tri mallongajn fragmentojn de la libro.

### **AEH**

Malgraŭ tio, ke mi ĝis nun ne sentas min handikapito, mi jam relative longe membras en la Asocio de Esperantistoj Handikapuloj. Tio okazis pro mia admiro kaj amikeco de ĝia motoro Jarmila Rýznarová (post la forpaso de la fondinto Josef Vaněček). Mi nur esceptokaze kontribuis al ĝia gazeto *Informilo* kaj kelkfoje mi prelegis ene de la AEH-tutsemajnaj lingvaj seminarioj, kiuj okazadis kutime minimume unufoje jare, iam eĉ dufoje. Jam antaŭ la forpaso de Jarmila Rýznarová la torĉon transprenis ŝia filino Lenka Angelová, kiu bedaŭrinde mortis baldaŭ post sia panjo, en marto 2021 kiel viktimo de kovimo, 62-jara.

La Asocio tamen daŭrigas sian agadon kaj aperigas *Informilon* kun almanako *Antaŭen* danke al Mirka Kosnarová kaj Luďka Srbová. Sed mi dubas, ĉu oni ankoraŭ trovos la forton revenigi la tradicion de la lingvaj seminarioj. Mi certe plu restos al ĝi fidela almenaŭ kiel pasiva membro.

## **E-mental‘**

E-mental‘ estas fondita en majo 1998 de kelkaj pragaj junaj esperantistoj kiel ŝajne nur Esperanto-ĝua klubo, kion ankaŭ indikas ĝia propra difino: *Klera despotismo – sendependa kaj propravola, kies registaro konsistas el Diktatorino, kiu ĉiam pravos (rim.: Vlasta, motoro de la klubo), ministroj, prezidantoj de oficoj, ambasadoroj kaj superambasadoroj...*

En tiun supergajan organizaĵon mi estis akceptita kiel ministro pri defendo de Esperanto en majo 1999 kaj ankaŭ Stanjo kiel ministrino por kontrolado de alkoholo en sango. Nu, jes, oni en siaj regulaj renkontiĝoj, kutime en la loĝejo de iu membro, ĉefe bone manĝas, babilas en Esperanto (nu, iam ankaŭ parte ĉeĥe, se ĉeestas iu komencanto), altigas siajn sciojn en la formo de diversaj kvizoj. Tamen E-mental‘ ankaŭ zorgas pri informado, dum siaj aranĝoj ekstere ili ĉiam montras grandajn priesperantajn ŝildojn, tradicie ekzemple en la turoj en diversaj ĉeĥaj urboj, kaj ankaŭ agas bonfare.

Oni povas eĉ konsideri ĝin kolektiva mecenato (adopto de du bestoj en la praga zoologia ĝardeno, por kies nutrado oni kolektas monon, partopreno de la aranĝoj, kiuj per aliĝkotizo helpas al handikapitaj personoj sub la slogano *Helpu helpi* kaj simile).

Kortuŝita mi estis kuŝante en malsanulejo kun postkovimaj komplikaĵoj, kiam neniu rajtis viziti min, sed rete mi ricevis la belan bondeziron de E-mentalanoj.



*Kuraĝiga deziro de resaniĝo*



## **Ekscio pri rezulto post multaj jaroj**

En la jaro 2022 la praga Esperanto-klubo festis 120 jarojn de sia ekzisto. Kiel membro de la klubo mi partoprenis kaj kontribuis per prelego pri la vivo kaj verko de Eli Urbanová, nia fama kunklubanino, ĉar ŝi havis eĉ du gravajn jubileojn: 100 jarojn post la naskiĝo, 10 jarojn post la forpaso.

La duan tagon, kiam mi ĉetabliĝis, restis apud mi libera loko kaj venis al mi ne konata juna viro kaj demandis, ĉu li povas apudiĝi. Li prezentis sin al mi kiel Adam Káva kaj mi al li, sed li interrompis min dirante, ke li min konas kaj li venis precipe, por ke li povu renkontiĝi kun mi.

Sekve li rakontis en flua Esperanto, ke li ĉeestis mian prelegon pri Esperanto antaŭ 15 jaroj en gimnazio dum la Eŭropa tago de la lingvoj. Kaj ke ni post la prelego parolis kaj ke mi eĉ donacis al li mian lernolibron *Esperantem za tři měsíce*. Kaj ke li laŭ ĝi vere lernis Esperanton, sed hodiaŭ li la unuan fojon parolas en ĝi kun alia viva esperantisto, antaŭe li uzis ĝin nur pasive en la reto. Kia bela surprizo de mi, trovante post 15 jaroj rezulton de mia iama prelego!

Tio rememorigis min pri alia pli frua ekscio pri la frukto de la sama lernolibro. Ni longe estas amikoj kun Petro Baláž, nun prave konsiderata unu el la plej famaj esperantistoj en la mondo. Sed neniam ni babilis pri niaj esperantistiĝoj. Do kia estis mia surprizo, kiam mi aŭdis lin dum lia prelego en la Esperanto-muzeo en Svitavy diri, ke li ellernis Esperanton vere dum tri monatoj lasante sin gvidi per la lernolibro de la ĉeestanta Petro Chrdle, *Esperantem za tři měsíce* (per Esperanto post tri monatoj). Nu, ĉu io povus pli plezurigi la aŭtoron de la lernolibro, ol se laŭ ĝi konatiĝis kun Esperanto tiu Esperanto-famulo?! Mi nur bedaŭras, ke tion ne ĝisvivis mia edzino kaj kunaŭtorino Stanjo.

Cetere, li ankaŭ eldonis la slovakon version de la pli ampleksa versio de ĝi *Esperanto od A do Z* (Esperanto de A ĝis Z) en traduko de Katarína Nosková en sia eldonejo Espero.

# Kiel po-ŝtup-umas „la afero Altior“

Margit Turková

(Raporto de praga klubano)

## Parto 1

Senteble la aĵo (afero), kiun ni tiel nomu, jam tiom enradikiĝis en nia esperantista klubo, ke ĝi meritas certan resumigon...

1. Jen: de la 24-a de novembro 2022, kiam en nian klubejon envenis du viroj – Vladimír Liščák (sinologo, akademiano) kaj Jiří Altior (multlertulo, kiel montriĝis), por prezenti al ni sian grandiozan projekton „Institut renesance kulturního dědictví“ (Instituto de renesanco de kultura heredaĵo), kaj esprimi seriozan intereson pri Esperanto, jam pasis tempo.

De tiam ni havas en nia „komuna konto“ kelkajn aferojn. Tiujn mi nun sternas antaŭ niaj legantoj.

2. Vizito de l’Altioranoj (plue nur l’A) en nia Muzeo en Svitavy, kie ili eksciis, ke Esperanto ankaŭ estas nacia heredaĵo, kiun ni tie kultivas. Tie ankaŭ okazis la plej grava paŝo – reciproka konatiĝo de ili kun niaj movad-funkciuloj (la prezidanto, la vic-prezidantino, la prizorgantoj de la Muzeo).

3. Epifanan (tříkrálový) koncerton l’A tradicie organizis en la preĝejo de St. Matiaso, (kiu troviĝas en la praga kvartalo Hanspaulka). Ke l’A serioze kaptis nian Lingvon, pruvis ilia koncertprezentado: kelkajn kristnaskajn kantojn kaj karolojn ili kantis en Esperanto. Se en la punkto 1. ni prezentis du virojn, nun estas la vico diri, ke la kolektivo havas pli multajn anojn – ili ĉefe okupiĝas pri muziko (instrument-ludo, kantado), kaj ke ties estrino estas Beata Altior (edzino de Jiří A).

Pri muziko ŝi okupiĝas profesie. Jenan eventon vizitis kelkaj pragaj esperantistoj.

4. Sur fono de la eldiritaj informoj, la plua estas eĉ pli surpriza! Enkadre de niaj malmultamasaj E-societoj ĝi sendube meritas la epiteton „grandioza“.

La 14-an de la januaro 2023 – (okaze de la morto-tago de beata Odoriko), okazis komuna renkontiĝo. La Fratoj franciskanoj – Minoritoj bonvenigis nin en la refektejo de sia monaĥejo (certe danke al bonaj rilatoj kun l’A), kiu apartenas al la apuda preĝejo (P. Marie Sněžné); tie okazis la solena meso, omaĝe al Odoriko, kiu estas patrono de la franciskana frataro (origine en la norda parto de Italio, Pordenone, naskiĝloko de la beatano).

Ĉar ni jam en niaj presaĵoj skribis pri la evento, nun ni ne ripetu la abundan programon de ĝi... Ni nur igas la legantaron imagi, ke ĝi havis multajn punktojn, se ĝi daŭris de la 15-a ĝis 22-a horo. Ĝi konsistis el paroloj, instrument-muzikeroj, kantoj, (multaj en E!), video-prezentaĵoj, filmo – tio en la flanko de niaj gastigantoj. Same riĉa je programpunktoj estis la Esperanto-parto: niaj ĉefuloj flue kaj klare informis la aŭditorion pri nia

movado – estis prelego (pri S.Schulhof), estis E-vikipedio, estis teo-festivalo en Ĉinio). Oni povas esperi, ke tiu ĉi evento fariĝis bazo de nia eventuala plua kunlaboro.

**5.** Intertempe J. A. vizitis la EK en Pardubice (ni tion vidis en INFORMILO) – kie fakte fontas (kaj kien celas) lia ideo pri la menciita projekto de la Instituto.

**6.** Poste okazis personaj kontaktoj de E-funkciuloj (kaj pragaj, kaj asociaj), en la hejmo de Altior-familio.

**7.** El tio tute nature disvolviĝas la agado, kiu senĉese estas bezona: ekzerci la Lingvon. Tio okazis en la Esperantista klubo en Prago, kiun vizitis la estimata Beata A. (kun sia gitaro). Aktuale ni tradukis kelkajn kantojn (laŭ ŝia deziro), kaj tuj ni provis la kantadon; ĝin akompanis gitar-ludo (B.A.), kaj ukulelo-ludo (de Tomáš Břicháček), kiu estas hobio-interesiĝanto en muziko kaj kantoj. Eble ni povas baldaŭ ĝoji aŭskultonte la „UKULELO-TRION“ (Tomáš Břicháček, Josef Kalčík, Pavla Dvořáková). Nur trovi la okazon por tio...

**8-a** estas la vico de mia persona „riporto“ ... (B.v. havi paciencon).

Mi ricevis invitilon por partopreni, je la 18. 2., nun omaĝe al la St. Matiaso-nomo, en la preĝejo, pri kiu jam estis mencio. Ĉar mia nepo nomiĝas Matiaso, ĉar estis bona vetero kaj ĉar tiu ĉi parto de Prago estas aminda kaj vizitenda, mi decidiĝis. Por la nesciantoj – La preĝejo estas famkonata pro siaj mesoj kaj kermesoj omaĝe al la sanktulo, kiuj iras profunden en la historion. (En nia epoko el tio restis nur foiregoj kun amasludiloj, en la Parko-Holešovice. Sed ni revenu al Hanspaulka). Ĉi-nune la grupo de l’A disponigis sian talenton al la afero de religia-komunumo, en kies socia kadro ĝi jam sufiĉe longe noble kunlaboras. Ni, la vizitantoj, ĝuis la meson, kaj poste la koncerton (estris B. A.). Jiří A. sciigis nin pri la historio de la evento (de la 18-a jrc).

Poste ili eĉ min prezentis al la vizitantoj – kiel reprezentanton de Esperanto – kio estis akceptita per sincera aplaŭdo. La amikeca renkontiĝo daŭrigis en apuda paroĥejo. Tie estis preparita frando-manĝo kun teo (ili estas „teo-adorantoj“). Kiu kredas „hazardon“, do sciu, ke hazarde tie ĉi troviĝis jena grava persono: la ano de la urba konsilantaro en Svitavy (ne kiel delegito, sed private). Jiří klarigis al li siajn (niajn!) planojn kaj intencojn. Kaj la reprezentanto promesis de sia flanko fari por ni ĉion, kio estos akceptebla por la urbo. En tiel esperplena perspektivo nia kunveno finiĝis...

La l’Altioranoj surloke decidiĝis fariĝi faka sekcio de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Tio estas por nia korporacio certe plezuriga afero. Ĉar almenaŭ Jiří A. estas serioza interesiĝanto pri E. kaj instigas nin okupiĝi pri nia ĉefa celo – kultivi la Lingvon (kion ni nun malofte faras).

## Parto 2

Kaj la tempo fluas...

Kaj mi povas daŭrigi pri la temo entute aktuale. Ĉar mi partoprenis jenan gravan aferon – **La 90-jaran jubileon de la Esperanto-klubo en Svitavy** (8.9.-10.9.). La afero havis kompreneble unuavice Esperanto-koncernan parton (sed pri ĝi mia riporto ne estu).

Nia temo estas l'A. La admirinda kolektivo konvinkis nin, ke ĉiuj ĝiaj anoj estimas Esperanton. Certe danke al la estro Jiří Altior, kiu fariĝis serioze respondeca esperantisto. Duonjare kunlabore prepariĝis (kun la EK S.) la arta programo por omaĝi la jubileo-aferon.

### SABATO

1. La geedzoj A. (Jiří, Beata) direktas ankaŭ siajn infanojn por akcepti Esperanton serioze. La infanoj ne nur partoprenadas, sed aktivas – ilia filo Damian (16 j.) malfermis la programon per „teoceremonio“, kiun li kultivas jam de sia eta-infanaĝo.
2. La sabata vespero sonis per kantoj, ĉu ĉeĥaj, ĉu Esperantaj. Elstara prezento de malgranda muzikgrupo – la (bel)kanto, violono – Beata A. (profesie muzikistino), kaj aliaj (pardonu, ke mi ne mencias ilin nome!). Kantpartoprenis ankaŭ ni, aŭditorianoj – ĉar ni havis en la manoj la tekstojn tradukitajn Esperanten. Nun mi elstarigu la ĉeĥajn tradukojn de Jiří A. !!! Sed eble ankaŭ Esperantaj tradukoj de niaj klubanoj (Turková, Břicháček) ne sonas malbele – opiniu vi mem:

VLTAVO, VLTAVO (Karel Hašler)

Pod skálou, na níž stál Vyšehrad,  
ku Praze valí se řeka.

Já bych se zeptal jí tolik rád,  
co na mě ve světě čeká.

Nikdy se ničeho neleknu,  
třeba jsem na světě rád,  
na břehu pod skalou pokleknu,  
budu se pokorně ptát:

Vltavo, Vltavo, vodičko hluboká,  
pověz mi, co bude do dne a do roka,  
pověz mi, co voda přinese,  
pověz mi, co voda odnese ?  
Řekni mi, kolikrát země se otočí,  
než český dragoun si na koně vyskočí.  
Kdy z noci odejde ošklivý sen,  
Kdy se zas rozbřeskne den

*VULTAVO, VULTAVO (Karel Hašler)*  
*Sub roko de reĝa Vyšehrad*  
*Larĝega fluegas river'*  
*Korpreme demandojn mi vokas:*  
*Gvidos min tra l'vivo Esper'?*  
*Sur la bord' kliniĝas humile*  
*Fascinas Panoramo,*  
*Kuraĝon esprimas ĝentile,*  
*Koron plenigas Amo*

*Vultavo, Vultavo*  
*Profunda rivero*  
*Vi estas, Vultavo*  
*Vejno de l'Espero*  
*Diru vi, kion vi alportos*  
*Diru vi, kion vi forportos*  
*Kelkfoje dum jaroj*  
*La Tero turniĝos*  
*Ĝis en la Patrujo*  
*Espero naskiĝos*  
*Ĝis la nokta koŝmaro perdiĝos*  
*Ĝis la Suno leviĝos*  
*Vultavo fluas kaj silentas, ne zorgas pri mia voko*  
*desude norden ĝi eskapas preter la altega roko.*  
*Ĉiam al obstakloj rezistos la river' de mia kor'.*  
*La roko staros kaj rezistos, neniuj movos ĝin for.*

### 3. DIMANĈO

Ni rememorigu, ke dekomenca punkto estis la omaĝo de beata Odoriko. La biografion de la monaĥo verkis Vladimír Liščák, ano de la Ĉeĥa akademio (danke al ĝi li doktoriĝis), kiu la volumon al ni prezentis. La unua paŝo estis farita je la 14-de januaro (vidu supre), la dua estis farita ĝuste en Svitavy. La akademiano mem havis prelegon pri la beata Odoriko; sed ne nur tion: ni eĉ spektis filmon, kiu estas kreita laŭ la menciita libro (la reĝisoro: Jan Eliáš Svatoš).

4. La jubileon pintis la „Himno omaĝe al beata Odoriko“ kiun ni ĝuis dum la koncerto, kiu okazis dimanĉe, je la 14a, en la baroka preĝejo. Spirhaltiga prezento de koncertgrupoj el Prago (LA VOJO DE MELODIO – estro Stanislav Mistr, PRAŽŠTÍ PĚVCI – estro Beata Altior). Admirinde klare kaj ĝuste sonis Esperanto el iliaj voĉoj! Ni rememorigu la buntan programon (kaj laŭimage ĝuu ĝin):

1. *Ludvík L. Zamenhof@Félicien Menu de Ménil: La Espero*
2. *Ján Valaštan-Dolinský@arr. Vojtěch Frank: Ne iradu preter ni !*
3. *Ján Valaštan-Dolinský@arr. Vojtěch Frank: Estas ja domaĝe*
4. *arr. Jan Fila: Inclitum Patrem (hymnus)*
5. *Vojtěch Frank: Nokto (premiéra)*
6. *Jan Fila: Himno omaĝe al beata Odoriko (premiéra)*
7. *John Willams@Antonín Pevala: Schindler list*
8. *arr. Vladimír@Ugodin Jan Fila: Ani ma'amin*
9. *Leonard Bernstein: Chichester psalms*
10. *Stanislav Schulhof@Vojtěch Frank: Nový duch se rodí po vší zemi*

Finfine fine: La supre menciita urbano de Svitavy – Libor Dynka -- plenumis sian promeson: teknikon-koncerne li faris ĉion, por ke nia komuna evento restu konservita por la rememoro de historio. Dankon!

---

## Institut renesance kulturního dědictví

Níže zařazujeme text ze stránek Institutu renesance kulturního dědictví, který stručně představuje tento ústav a jeho základní cíle.

Institut renesance kulturního dědictví z. ú. se zaměřuje na šíření a rozvoj tradic a kulturně historických témat coby součásti všeobecného kulturního dědictví, čímž se snaží zabránit úpadku těchto tradic v důsledku zrychleného životního stylu moderní společnosti, která stále více závisí na technologiích a krátkodobých, a tudíž nedostatečně rozvinutých společenských vztazích.

Institut vychází z toho, že starobylé tradice jsou nositelky a reprezentantky hodnot natolik zásadních, že stály našim předkům za to, aby si je mezi sebou celá staletí předávali, a proto jsou tradice ze své podstaty součástí identity každé společnosti, kterou spoluutvářejí a sjednocují, a zároveň jsou závislé na interpretaci, a tudíž bez skutečného zájmu společnosti se rychle vytrácejí z její kolektivní paměti. Institut hledá takové efektivní způsoby ožívání jednotlivých tradic, aby se nevytratil jejich původní obsah a za tímto účelem poskytuje svoje specializované služby. Navíc si klade za cíl nacházet účinné způsoby, jak překlenovat propast času, navazovat na konkrétní odkazy předků, nalézat v nich jejich hodnotový a kulturně historický obsah a vdechovat původním tradicím nový život zajímavým, osvěžujícím, a přitom co nejméně zkreslujícím způsobem.

Dále si Institut klade za cíl podílet se na vzniku nových místních i celospolečensky přínosných tradic a vytvářet podmínky pro jejich uchycení ve společnosti se zřetelem na jejich dlouhodobý rozvoj, a to především formami umělecké a odborné prezentace a vývojem technologií a potřebných edukačních metodik nezbytných pro jejich efektivní uplatnění. Ke všem zpracovávaným kulturně-historickým tématům na něž jednotlivé tradice odkazují, přistupuje Institut zároveň jako k vědnímu oboru, k sociálnímu a kulturnímu fenoménu a jako k živé tradici.

Za tímto účelem realizuje Institut odborný výzkum kulturně-historického dědictví, podporuje jeho uchování a další rozvoj nebo vznik nových společensky prospěšných tradic, přičemž tak činí přímou či nepřímou formou, a to především skrze organizování odborných konferencí a seminářů, sběrem informací a tvorbou analýz a publikací souvisejících s touto tematikou, a dále skrze vytváření znalostních zdrojů, metodik, expertních služeb a technologií a vzorových konceptů souvisejících s touto tematikou a potřebných pro její rozvoj, jakožto i vytvářením potřebných odborných a sociálních vazeb, komunikačních a informačních kanálů a realizací či zprostředkováním služeb nezbytných pro úspěšné dosažení deklarovaných cílů Institutu.

Aby tradice, kterým Institut věnuje svoji pozornost, měly dlouhodobou perspektivu, soustředí se Institut i na dlouhodobá řešení, vytváření encyklopedických zdrojů a systémů vzdělávání v relevantních tematických okruzích a finanční a hmotné zajištění svého chodu.



[www.irkd.cz](http://www.irkd.cz)

## Naděje *La Espero*

L. L. Zamenhof / Félicien Menu de Ménils

Nový duch se rodí po vši Zemi,  
světem mocné volání se nese,  
posílené vánku perutěmi,  
ať po širém kraji rozlétne se.  
Nemá touhy po krvavých zbraních,  
chce být tmelem všelidskému rodu,  
světu, který tolik válek zažil,  
harmonickou nabídnout chce shodu.

*Sub la sankta signo de l'espero  
kolektiĝas pacaj batalantoj,  
kaj rapide kreskas la afero  
per laboro de la esperantoj.  
Forte staras muroj de miljaroj  
inter la popoloj dividitaj;  
sed dissaltos la obstinaj baroj,  
per la sankta amo disbatitaj.*

Neutrální jazyk základem je,  
k vzájemnému porozumění si,  
když ve shodě dílo k cíli spěje,  
propojí se kruhy rodinnými.  
Potom píle uvnitř společenství,  
dodá sil při práci v prospěch míru,  
ať sen krásný o společném lidství  
požehnaných dosáhne svých cílů.

*En la mondon venis nova sento,  
tra la mondo iras forta voko;  
per flugiloj de facila vento  
nun de loko flugu ĝi al loko.  
Ne al glavo sangon soifanta  
ĝi la homan tiras familion:  
al la mond' eterne militanta  
ĝi promesas sanktan harmonion.*

Pod posvátným znamením naděje,  
šikují se míru bojovníci,  
společná věc rychleji se děje,  
když se snaží lidé doufající.  
Mocné hradby stojí věky celé,  
tisíce let lidstvo rozdělují,  
nezadrží nápor lásky svaté,  
nakonec se její vahou zřítí.

*Sur neŭtrala lingva fundamento,  
komprenante unu la alian,  
la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.  
Nia diligenta kolegaro  
en laboro paca ne laciĝos,  
ĝis la bela sonĝo de l' Homaro  
por eterna ben' efektiviĝos.*

Autor textu: L. L. Zamenhof

Autor hudby: Félicien Menu de Ménil

Do češtiny nově přeložili: Jiří Altior a Miloš Lukáš (2023)



## Lama ĉevalo *Kulhavá kobyla*

V. Dubský

1. Homoj ridas al mi pro mia ĉeval'  
kiu tute lama estas  
Mi ignoras ilin, negrava detal'  
bona humoro kun mi restas

R.:

Mia lama ĉeval' kun mi  
tra la mondo vagas  
kaj gaje mi fajfas laŭ la paŝoj,  
(*fajfi*)  
ĝoja ŝajnas al mi mond'.

Nenien gvidas mia voj',  
mi vagas nur sencele  
kaj gaje mi fajfas laŭ la paŝoj,  
(*fajfi*)  
mi vagadas sen reven'.

Kiam lulas min sur sia  
dorso la ĉeval'  
rozkolora fariĝas la mond'.

Mia lama ĉeval' kun mi  
tra la mondo vagas  
kaj gaje mi fajfas laŭ la paŝoj,  
(*fajfi*)  
ĝoja ŝajnas al mi mond'.

2. Mi kredas, ke iam la tempo venos  
mi ne perdas la esperon  
ke mia ĉevalo lamiri ĉesos  
ĝi spertos grandan regeneron

R.:

# Vultavo, Vultavo *Vltavo, Vltavo*

K. Hašler

*Versio de M. Turková*

Sub roko de reĝa Vyšehrad  
Larĝega fluegas river'  
Korpreme demandojn mi vokas:  
Gvidos min tra l'vivo Esper'?'  
Sur la bord' kliniĝas humile  
Fascinas Panoramo,  
Kuraĝon esprimas ĝentile,  
Koron plenigas Amo

Vultavo, Vultavo, profunda rivero,  
Vi estas, Vultavo vejno de l'Espero  
Diru vi, kion vi alportos  
Diru vi, kion vi forportos  
Kelkfoje dum jaroj la Tero turniĝos  
Ĝis en la Patrujo Espero naskiĝos  
Ĝis la nokta koŝmaro perdiĝos  
Ĝis la Suno leviĝos

Vultavo fluas kaj silentas,  
ne zorgas pri mia voko  
desude norden ĝi eskapas  
preter la altega roko.  
Ĉiam al obstakloj rezistos  
la river' de mia kor'.  
La roko staros kaj rezistos, neniun  
movos ĝin for.

Vultavo, Vultavo, profunda rivero,  
Vi estas, Vultavo vejno de l'Espero  
Diru vi, kion vi alportos  
Diru vi, kion vi forportos  
Kelkfoje dum jaroj la Tero turniĝos  
Ĝis en la Patrujo Espero naskiĝos  
Ĝis la nokta koŝmaro perdiĝos  
Ĝis la Suno leviĝos

*Versio de T. Břicháček*

Fluegas akvo sub alta rok',  
al Prago ĉiam rapidas,  
pensas mi foje en tiu lok',  
kien la sorto min gvidas.  
Mi ja ne ektimas facile  
kiom ajn kruda la ver',  
borden mi alpaŝos humile,  
demandos al la river'.

Vultavo, Vultavo, profunda rivero,  
por vi la futuro ne estas mistero,  
diru vi, kion ĝi alportos,  
diru vi, kion ĝi forportos.  
Diru, kiomfoje la tero turniĝos,  
antaŭ ol Ĉeĥio denove leviĝos,  
kiam la koŝmaro malaperos,  
kiam mateno venos?

Vultavo fluas kaj silentas,  
ne zorgas pri mia voko  
desude norden ĝi eskapas  
preter la altega roko.  
Ĉiam al obstakloj rezistos  
la river' de mia kor'.  
La roko staros kaj persistos,  
neniun movos ĝin for.

Vultavo, Vultavo, profunda rivero,  
por vi la futuro ne estas mistero,  
diru vi, kion ĝi alportos,  
diru vi, kion ĝi forportos.  
Diru, kiomfoje la tero turniĝos,  
antaŭ ol Ĉeĥio denove leviĝos,  
kiam la koŝmaro malaperos,  
kiam mateno venos?

## Himno omaĝe al beata Odoriko

1. Glo - ras la Pa - tron mul-taj pi - aj fra - toj /  
pre - ĝe a - do - ras la bo - nan Pa - tro - non /  
laŭ - dan - te li - ajn a - gojn en Ĉi - ni - o /  
re - gno, re - gno la fo - ra.

1. Gloras la Patron multaj piaj  
fratoj,  
preĝe adoras la bonan patronon,  
kantas Ĉinio, laŭdas liajn agojn  
regno la fora.

2. Savon li portis al popoloj  
nombraj,  
demon-minacojn pelis Odoriko,  
kredon Tataroj de li tuj adoptis,  
falon timante.

3. „Mia martira sango,“ li mem  
diris,  
ŝprucu sur landojn dronajn en  
mallumo,  
savon, Sinjoro, por eterna tempo  
portu al ili.”

4. Povrajn li nutris, la humilajn levis,  
vundojn de Kristo kisis ĉiutage,  
preĝis sincere Virgulinon Sanktan  
per fidela kor'.

5. Frato Beata, Odoriko brava,  
pruvi ni volas pietaton altan,  
sangan oferi: palmon de martiro  
premi per polmoj.

*Esperantigis Miroslav Malovec*

## Josef Rumler kaj Esperanto

Eli Urbanová

Li estis apenaŭ dek-unu-jara, kiam li en biblioteko de sia patro trovis verketon Japanaj fabeloj. La duan fojon li renkontis Esperanton en la jaro 1948 en Varsovio, kiam signifa pola poeto Tuwim konvinkis kolegojn en kafejo, ke ĝi taŭgas por la ĵurnalistiko, ne por beletro. En la jaro 1978 lin por la internacia lingvo Esperanto definitive gajnas Jiří Karen.

Josef Rumler. Liaj ses ĉeĥaj kolektoj. Lia *Lasta ĉevalo*, poemego aperinta en la jaro 1985 en literatura suplemento de la gazeto Paco kaj en la jaro 1992 eldonita de Fonto en Brazilo. Reprezente, kun ilustraĵoj de Karel Oberthor. Jen kiel ĝin aprecas pintoj de la Esperanta movado: Rosseti parolas pri „potenca, obseda verko kun neordinaraj sonharmonio kaj onomatopeoj.“ Auld pri „gravega poemo en la kadro de nia originala literaturo.“ Knoedt komparas la aŭtoron al Halley-kometo, fenomeno, kiu sur la firmamento montriĝas unufoje dum cent jaroj...

Tuj post tiu ĉi ascendo sur la Esperantan Parnason cedas la kreado flanken kaj Rumler enpesiĝas pri ebloj de la internacia lingvo. Hu, kiom da miskomprenoj kaŭzis lia eseo *Abunde kaj redunde* eldonita en la jaro 1986 kiel memstara suplemento! Praga skolo travivas tempon de obskuro. Dum la demando de sinonimoj restas aperta, ni nian postulon de riĉa vortaro esence ne ŝanĝis. Koscia evoluo de la planita lingvo necesas. Karen pravas, la tutmonda komunumo akceptos Esperanton nur tiam, kiam ĝi en ĉiuj lingvaj aspektoj superos sian ĉefan konkuranton, nome la anglan...

Sed retro al Rumler. „Tradukinto, kiu ignoras intence neperfektan vortordon, la aĵon mortigas. Verkisto rompas al si la kapon, penas esprimiĝi nature, konversacie, kaj poste ia idioto transkondukas tion en la lernolibran stilon.“

Kiun ne entuziasmigus la filmo *Dancejo* de la itala reĝisoro Scoli. Ĝi evokas atmosferon de diversaj fazoj de la tridekaj jaroj. Kurtaj, groteske pufitaj, plimulte tragikaj epizodoj devolviĝas preskaŭ ekskluzive sur la pargeto, sen unusola vorto, mirinda efekto atingata pere de la muziko kaj konduto de la protagonistoj, Mi rekomendis ĝin al Rumler. Mi scivolis je lia opinio. „Elkrei ion tian kaj morti...”

Rumler, tiu malgranda granda viro... Kiam ajn mi lin vidas, ĉiam revenas al mi ĉi ĉeĥa lido: *Nur vi al mi, mastrino, verŝu bieron, ke mi estas eta, ne rigardu tion. Kvankam mi ne elkreskis, mi havas sufiĉe da mono, mi al vi pagi povas kiel alia persono...*

Sincere dirite niaj dialogoj en telefono estadis ofte senfinaj... Tio ne estis telefonaĵoj, tio estis universitataj prelegoj! Por mi persone ili estis kompreneble senlime instruaj...

Koncerne mian prozon *Hetajro dancas*, kontinue rakonti mi ne kapablis. Tial do divido je nelongaj, tamen koneksaj pecoj. Ĉu ne, kia invento! „Tion oni nomas kubismo.” Ja estis laboro! Unu storieton ne kaj ne fermi. Fine al mi venis ideo distondi ĝin kaj la partojn prove kunmetadi. Laŭdire temas pri tiel nomata eltonda metodo! Rumler estas vere terura! Kaj se mi en certa kompleksa frazo daŭrigis trans la tutan paĝon, aha! „Momenton.” Rumler turniĝis al sia respektinda biblioteko kaj enmanigis al mi *Dancaj horoj por la progresintoj* de Bohumil Hrabal, kie kompleksa frazo trairis la tutan libron...

Intertempe la taŭzita nivelo lante trankviliĝis... Ni ne plu emas provoki. Voĉo de la popolo, voĉo dia... En la jaro 1989 eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio denove kiel memstaran suplementon dulingvan spegulan tradukon de Josef Rumler sub jena titolo: *Tute eta nekompleta antologio de la nuntempa ĉeĥa poezio – Nuntempaj ĉeĥaj poetoj en 1000 versoj*. Merita verko, en kiu vi vane serĉus neologismojn...

Tion, ke la traduka aktivado nian majstron de ĉiam logis, konfirmas liaj tradukoj el la pola. Hodiaŭ li kun egala interesiĝo tradukas en Esperanton, latinon... „Dulingvaj spegulaj eldonoj ebligas al ni la komparon kaj estas ege gravaj por la interlingvistiko.” Klare, sed kial li tradukas Mácha? Ĉu tio ne estas superflua? Unua maja postvesper’, vespera maj’, la amsezono’... Kio al li sur la traduko de Tomáš Pumpr ne plaĉas? Al mi ĝi sonas bele! Josef Rumler. Kiel ĉeĥa teoriulo kaj editoro li partoprenis eldonon de *Majo* precize kvinfoje – la ĉeĥan en la jaroj 1961, 1964, 1972, 1973 kaj en la jaro 1997 la Esperantan. Per postparoloj, studaĵoj, komentarioj. Al *Majo* li havas aparte proksiman rilaton. *Majo* estas kvazaŭ lia ido. Tial li ne povas al la traduko de Tomáš Pumpr silenti, simple ne povas. Kvankam li mem tiun eldonon iniciatis...

Kaj ree mi kuras al la telefono kaj ree mi diskutadas pri doktoro Pumpr. Pri lia trapoemigo de *Bapto de caro Vladimiro*, verko de Karel Havlíček Borovský. Ni memorigu al ni, ke ĝia prestiĝa eldono en la jaro 1996 okaze de la 81-a Universala kongreso en Prago pere de Fonto efektiviĝis je la propono de Josef Rumler, kiu prizorgis la postparolon. „Ĝi estas nepre la plej bona traduko el la ĉeĥa en Esperanton... Pumpr plene ekkomprenis artismajn kvalitojn de tiu ĉi unika artefakto, kiun li plie riĉigis per internaj rimoj... Tamen atenton! Per sia traduko de Havlíček li elkreis ekvivalenton de verko, kiu apartenas en la genron de satiro, kio tute ne signifas, ke li same sukcesis sur la kampo de liriko! Per la traduko de *Majo* li ofertis al la leganto solidan bazan informon, jen ĉio! Ĉar li preskaŭ en ĉiu verso uzas elizion, li senigas la poemon je vokaloj kaj do je ties muzikeco...”

Ni vokis al ni ĉiutage. „Niaj tradukistoj ĝis nun praktikadas la manieron kiel eble plej fidele imiti formon de la originalo, tio estas konservi la silabnombron. Tiu ĉi „monda” metodo validis en la tempo de Vrchlický.

Novan rigardon sur la tradukon de la poezio alportis Karel Čapek kaj lia generacio per siaj tradukoj el la franca. De tiam estas preferata la emociemo de la originalo... Ĉar la vortprovizo kaj longeco de vortoj ĉe unuopaj eŭropaj plimulte fleksiaj lingvoj ne tro diferencas, ne estis tia traduko problemo. Esperanto laŭ la strukturo estas lingvo aglutina. Ĉi tie kreiĝas la vortoj helpe de la prefiksoj kaj sufiksoj. Tial la verso tradukita en Esperanton estas regule pli longa...”

Josef Rumler kaj Esperanto. Lia „tute eta nekompleta” medailono. Laŭ mia juĝo traduko de *Majo* el la plumo de Josef Rumler prezentas similan apogeon, kian li iam akiris per sia originala poemo *Lasta ĉevalo*. Tion scias nu ni kelkaj, ke *Lasta ĉevalo* estas verko inspirita, verko, kiu elŝprucis kiel gejsero, ja ĝi naskiĝis dum nuraj tri tagoj, dume la traduko de *Majo* en Esperanton daŭris tri monatojn...

Tion, ke mirakloj okazas, pravas dulingva spegula *Majo* sur mia tablo. *Majo* en du faskoj, ambaŭ kun ĉarma portreto de Karel Hynek Mácha. *Majo*, kiun Josef Rumler tradukis, detale analizis kaj en la jaro 1999 eldonis je la propra kosto. *Majo*, kie la tradukita verso respondas al la originalo ne per nombro de la silaboj, sed per nombro de akcentoj – iktoj. *Majo*, en kiu ne ekzistas elizioj. Se mi ekpensas, ke en la traduko de Tomáš Pumpr troviĝas da ili preskaŭ mil! *Majo*. Mi legas ĝin laŭte, lante, kun ĝuo de gastronomo. Iam tiam mi haltas por denove elgustumi lokon precipe paradan... Ankoraŭ antaŭ ekdormo mi flustras al mi: *Estis tarda vespero – la unua majo – por amo estis sezono*.

Rilate al Josef Rumler ni volus rekomendi du novajn prelegojn, kiuj troveblas en Jutubo:

1) Miroslav Malovec: *La Praga skolo*


<https://www.youtube.com/watch?v=jbkqg-NA-iI>

2) Tomáš Břicháček: *Josef Rumler kaj lia verko*

[https://www.youtube.com/watch?v=\\_idycej7dEY&t=2s](https://www.youtube.com/watch?v=_idycej7dEY&t=2s)

## Ostravský páter (recenze)

Tomáš Břicháček



*Nová fantasy kniha Marka Skřípského „Ostravský páter“ nabízí dobře namíchaný koktejl napětí, humoru, romantiky, historie a patriotismu. To vše okořeněné ostravským dialektem a jadrnými výrazy.*

V květnu vyšla v nakladatelství Straky na vrbě kniha „Ostravský páter“ od Marka Skřípského. Jde o volné pokračování jeho „Ostravských mystérií“ z roku 2019. I tentokrát jde o tajuplné příběhy z Ostravska z doby první republiky.

Hlavním hrdinou je římskokatolický kněz Josef Bronský, kterého známe už z předchozí knihy, kde byl ovšem jen jedním z trojice ústředních

postav. Bronský plní pro církev různé nevšední úkoly (na okultní frontě). Je to postava velmi sympatická a lidská a také zdravě svérázná.

Kniha se skládá z osmi příběhů, které se odehrávají v letech 1928 až 1935. Ostravský páter se musí utkávat s protivníky různého druhu, od nacistických okultistů, přes satanisty až po hydrona.

Jak už je u Marka Skřípského počínaje jeho čtyřdílnou ságou o inspektorovi Rádlovi zvykem, kniha je dobře vyvážený koktejl napětí, humoru, romantiky, historie a patriotismu. To vše v tomto případě okořeněné ostravským dialektem a místy pěkně jadrnými výrazy.

Potvrzuje se, že Skřípský dokáže psát fantasy tak, že zaujme i ty z nás, kdo tomuto žánru jinak vůbec neholdují. (To má společného s Tomášem Bandžuchem, se kterým už ostatně také napsal dvě knihy jako spoluautor.) Svoji roli v tom asi hraje zasazení mnoha jeho příběhů do období první republiky či druhé světové války a do tehdejších reálií, které jako vystudovaný historik dobře zná.



Ekde printempo 2023 ni riĉigas nian kanalon en Jutubo per multegaj rikordoj de literaturaj juveloj de pragaj kaj aliaj ĉeĥaj verkistoj. Ĉu vi volas helpi? Ĉu vi volas, ke niaj verkistoj parolu per via voĉo? Skribu al ni. Vi ricevos tekstojn kaj sufiĉas rikordi ilin en via poŝtelefono aŭ komputilo kaj sendi la rikordon al ni.

---

Venontaj kunvenoj: 26. 10. / 9. 11. / 23. 11. / 7. 12. / 21. 12.

**Klub esperantistů v Praze,**  
pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7 – Holešovice, PSČ 170 00  
 Web: <http://bulteno.cs-retromusic.net>  
 E-mail: [paha@esperanto.cz](mailto:paha@esperanto.cz)  
 Facebook: <https://www.facebook.com/esperantoprago>  
 YouTube: Esperanto Prago  
 Schůzky: Ve Smečkách 25, Praha 1 – Nové Město, PSČ 110 00